

## & Neniam:

< Ripete 6 el 31 batoj por strofo, entute 155 paŝoj dum 2 minutoj. Norda Kantaro #4228. Verkis Aasmund Olavsson Vinje (1859). Popolmelodio. El norvega tradukis Jon Rømmesmo kaj Odd Tangerud.>

### (#Melodio:

<1,7:31> (

Mi /SiiLa Ti redo LaaLa So Mi;Mi ReeTI Do DoDo ReeRe Mi Mi;Mi SiiLa Ti redo  
LaaLa So o;Mi ReeTI Do DoDo ReeRe Mi i;Mi ReeTI Do ReRe MiiSi La a

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 Ne/niam vi elmemore pasas, ; ĉar rev' pri vi min ja ne forlasas. ; En lum', mallumo ĉeestas vi. (; Precipe nokte vin vidas mi.)×

'2 Vi ludas ĉirkaŭ mi dum vagado. ; Mi aŭdas vin en la korfrapado. ; Vi ĉiam sekvas min dum la ir', (; samkiel ombro post la vir'.)×

'3 Se iu venas kaj anson premas, ; ke estas vi en esper' mi kredas. ; Por bonvenigo eksaltas mi, (; sed vidas tuj ke ne estas vi.)×

'4 Ĉe ventbrueto en foliaro ; mi kredas vidi vin en branĉaro. ; Min trompas ade okaza ŝajn' (; mi kredas vidi vin kie ajn.)×

'5 En veturanto aŭ en rajdanto ; mi vidas vin, eĉ en bild', en kanto, ; en son' de ĝojo kaj de dolor' (; Mi plej vin aŭdas en mia plor'.)× )